

La engaĝiĝo de Mario Dazzini: eduki al integriĝo inter lingva sentemo kaj homama vokiĝo.

Nicola Reggiani

La esperantista aventuro de Mario Dazzini (Pietrasanta, 1910 – Massa, 1985) trovas sian plej rimarkindan manifestiĝon en la starigo, en 1972-a, de la tre bone konata “Esperanta nacia Biblioteko kaj Arkivo” en Massa, “kultura institucio internaciskale konata, unuaranga en sia sektoro”, kiel prave ĝin difinis Benedetti 2008:60, kiun Dazzini, kune kun sia fratino Catina (1917 - 1997), komencis ekplani ekde la Kvindekaj jaroj, sed kiun li povis realigi nur post la gravaj donacoj de konataj Esperanto-fakuloj kiaj Bruno kaj Elio Migliorini, Corrado Grazzini, Luigi Minnaja, Giorgio Canuto; tamen, malgraŭ ke ĝi estas plej verŝajne lia plej signifoplena kaj videbla realigo, la Biblioteko de Massa ne estis la ununura iniciato de Dazzini enkadre de lia intereso por la Internacia Lingvo, en kiu evidente li trovis fekundan grundon por la evoluo de propra persona engaĝiĝo por la kultura kaj socia evoluo – engaĝiĝo kiu percepteblas jam tuj post la dua mondmilito, kiam, en 1945, li iniciatis komitaton por la renaskiĝo de la Industria Apŭana Zono, kies ĉefa celo estis eviti la ruiniĝon de la strukturoj kaj la reutiligon de la maŝinaro forlasita de la germanoj, fondante, du jarojn poste, konsorcion de la lokaj industriistoj, kies sekretario li estis ĝis fino de 1975-a.

Dazzini alproksimiĝis al Esperanto deksep-jaraĝa, kaj iom pli sisteme ekde 1952, sub la gvido de prof-ro Antonio Grosso, tiuepoke prezidanto de la Massa Esperanto-Grupo; plurfoje elektita konsiliano de Itala Esperanto-Federacio, li iĝis ĝia prezidanto de 1979 ĝis 1983, kaj poste honora prezidanto; ekde 1967 li estis membro de Itala Esperanto-Instituto kaj de 1979 de la Akademio de Esperanto.

Li aparte sindediĉis al la eduka potencialo de Esperanto ne nur por la kultura kresko de la junularo, sed ankaŭ por la sentemigo kaj por disvastigo de la plej ĝeneralaj homrajtaj postuloj, ĉar, kiel estis tre bone esprimite, “kiu lernas Esperanton ne lernas la historion, la kulturon de iu lando, sed tiujn de senlima mondo en kiu ekzistas grandaj kaj malgrandaj (sed ne malpli gravaj) kulturoj, pli aŭ malpli disvastiĝantaj lingvoj, sed en kiu ĉiuj devas esti gardataj kiel unu el la pluraj riĉecoj de la homaro” (Gaggero 2007:7).

Aparte notindas lia kunordiga rolo de la IEF-komisiono kiu, ekde 1964, prilaboris leĝprojekton – poste prezentita, numero 1489, en 1969-a – por (kiel diras la oficiala titolo) “la instruado de la internacia lingvo Esperanto kaj de la koncerna literaturo en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj” (la projekto estis poste reaktualigita kun modifoj en 1974, ĉiam kun la involviĝo de Dazzini, kiel eblas konstati per atesto eldonita interrete de Antonio De Salvo je la adreso: <https://it.groups.yahoo.com/neo/groups/Associazioneesperantistatриestina/conversations/messages/959>); se en la unuaj Sepdekaj jaroj Dazzini antaŭpreparis la tutan necesan materialon kiu ebligis al senatano Alberto Del Nero establi la Interparlamentan Grupon de Esperantistaj Deputitoj kaj Senatanoj al kiu aliĝis reprezentantoj de ĉiuj politikaj partioj, en 1973 li

estis eĉ akceptita, kune kun Antonio De Salvo, de la tiam ministro pri Publika Instruado Oscar Luigi Scalfaro, kaj, en sia rolo de ĝenerala sekretario de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj), li sin devontigis antaŭenpuŝi la agadon de la instruistoj en ĉiuj landoj de la mondo (tre signifa estas la letero “Esperanto lingvo de la mondo” publikigata de Dazzini ĉe *L'Europa* 15 (1970), pĝ. 38).

En 1968 laŭ invito de amiko Ugo Bastogi, prezidanto de la livorna sekcio de la Internacia Ligo de la Homaj Rajtoj (LIDU), li donis prelegon kies titolo “la lingvaj diskriminacioj kaj la internacia lingvo Esperanto” (Rossocci Bastogi 1994: 73), travidigas tiun lian vizion de la rolo de Esperanto en la mondaj kulturaj dinamikoj (ĉies lingvo, ĝuste ĉar nenies lingvo, Esperanto povas iĝi la ĉefa instrumento por la forigo de la bariloj kiuj estas ne nur lingvaj sed ankaŭ politikaj, kulturaj, sociaj), kiun ankoraŭ, en decembro de la sama jaro, li ilustris per artikolo en la *Rivista massonica* [“Framasona Revuo”], dediĉita al “La Ĉarto de la Homaj Rajtoj, la lingvaj diskriminacioj kaj Esperanto”, en kiu li denoncis kiel, ĝuste ene de la ĉefa reprezenta institucio de Unuiĝintaj Nacioj, sensacie okazantis la unua ekzemplo de lingva diskriminacio. Legeblas en tiu kontribuajo:

La asembleo de UN utiligas la tieldiritajn “laborlingvojn” aŭ “oficialajn lingvojn”. Elektante kiel laborlingvoj la lingvojn de iuj popoloj kaj ekskludante la aliajn, UN realigas lingvan diskriminacion. Do ene de UN mem estas lingvaj diskriminacioj kaj mi opinias ke neniu povas tion nei. [...] En la internaciaj rilatoj, krome, konstateblas la grava fenomeno de la trudado de lingvoj kaj kulturoj de la popoloj nombre fortaj kaj gajnintoj de milito, super la popoloj malfortaj aŭ ĉiukaze venkitaj: kaj en iuj kazoj tiu trudado iĝas lingva kaj kultura genocido.

Temaro ĉiam pli brule devige aktuala, kiu ne hazarde trovis spacon en framasona eldonaĵo. Dazzini aliĝis al Framasonismo la 6-an de aŭgusto 1947, kaj restis membro senpaŭze dum tridek ok jaroj, okupante la oficon de loĝiestro de la “Carlo Sforza” (606) de Massa Carrara.

En la Skota Antikva kaj Akceptita Rito li atingis la 33-an kaj lastan gradon de ‘granda ĝenerala inspektoro’, kaj plenumis ankaŭ gravajn oficojn je interprovinca nivelo kaj, laŭ la memoriga broŝuro kiun dediĉis al li en 1986 la loĝio de Massa, temas pri la “itala plej aktiva kaj en esperanta monda medio plej konata framasono” (v. Astori 2010: 186, n. 47).

La intereso pri la framasona movado certe venis de la samaj intencoj kiuj lin kuntrenis en la esperantan mondon: la etikaj gvidlinioj de toleremo, internaciismo, tutmonda homfrateco, tipaj de la framasona vizio, estas la samaj troveblaj en la filozofiaj fundamentoj (kaj preskaŭ religiaj, kiel plurfoje oni rimarkigis) de la zamenhofa ideo de “morala ponto, pere de kiu oni povas frate unuigi ĉiujn popolojn kaj ĉiujn religiojn” (vd. Leteron de Zamenhof al Michaux de 21/02/1905), naskante poste la difinon de la principoj de la tiel dirita Homaranismo.

Kuniĝas esperantisman kaj framasonisman, iu kultura ruĝa fadeno kies elstaraj aspektoj ne povis ne trafi la sentemon de Dazzini: en la “Identeco de Itala Granda Oriento” estas eksplicitigita ke “la Framasonismo de Itala Granda Oriento de Palaco Giustiniani estas inica ordeno kies membroj agas por la morala kaj spirita plibonigo de

la homo kaj de la homa familio. La naturo de framasonismo kaj de ĝiaj institucioj estas homama, filozofa kaj morala [...] (<http://www.grandeoriente.it/chi-siamo/identita-del-grande-oriente-d-italia>).

Ĝi stimulas la toleremon, praktikas la justecon, helpas la bezonhajn, antaŭenpuŝas la amon por la proksimulo kaj serĉas ĉion kiu kunigas inter ili la homojn kaj la popolojn por pli bone kontribui al la realigo de la tutmonda homfratiĝo. La framasonismo asertas la grandan valoron de la unuopa homa persono kaj rekonas al ĉiu homo la rajton kontribui memstare al la priserĉado de la Vero” (Granda Itala Oriento, “antikvaj devoj, konstitucio, regularo de la ordeno, G.K: 31 de marto / 1-2 de aprilo 2006, paĝ XVI-XVII (<http://www.grandeoriente.it/chi-siamo/identita-del-grande-oriente-d-italia>)).

Zamenhof (probable ankaŭ li aliĝinta al la Institucio) aparte insistis pri la lingvo kiel instrumento por interfratigi la homaron laŭ la devizo de tutmonda morala renovigo, sed evidentas ke la bazaj intencoj estas la samaj: de la antaŭparolo al la Dogmoj ni ekscias ke “la homaranoj, membroj de Homaranismo, esperas ke, pere de konstanta kaj reciproka interkomuniko surbaze de neŭtrala lingvo kaj de religie neŭtralaj principoj kaj moroj, la homoj iun tagon kunfandiĝos en unu nura popolo neŭtrale-homa”.

Ne preteratentblas, en la kultura paralelismo inter la du movadoj, iun “edukon” fonon, kiu devintus esti la fokusa punkto por Mario Dazzini, kiu, kiel instruisto, antaŭenpuŝas la edukon valoron de la esperantista didaktiko; inter la “devoj” de homaranisto estas la invito “kontribui al paŝ-post-paŝa prilaboro de iu komun-homa filozofie pura religio” (dogmo XI). En la homarana templo, ejo de spirita leviĝo kaj kunvenejo por la kunfrataro, oni devos plenumi – laŭ la vizio de Zamenhof – lernokaj diskut-aktivecojn:

Tiu templo devas eduki la junularon ilin puŝante batali por la vero, la bono, la justeco kaj la interfratigo rilate al ĉiu homo, pliigi en ili la amon por la honesta laboro kaj la naŭzo por la vortoŝutantoj kaj por ĉiu malvirto” (ankoraŭ dogmo XI);

analoge, framasonismo laŭstatute “stimulas la toleremon, praktikas la justecon, helpas la bezonhajn, antaŭenigas la amon por la proksimulo kaj serĉas ĉion kio kunigas inter ili la homojn kaj la popolojn por pli bone kontribui al realigo de la tutmonda interfratigo” (el la jam citita “antikvaj devoj, konstitucio, regularo de la ordeno”): kompleksa kaj rava esotera reto de bazaj kaj edukaj idealoj, kiuj en Mario Dazzini iĝas eduk-forĝiga inspiro, kvazaŭ “misiisto”, kiu vigligis lian paralelan engaĝon en ambaŭ kulturaj movadoj, kaj kiu fluas al la praktika solvo de tutmonda lingvo kiu ankaŭ ĉe la institucioj iĝu ilo por integriĝo, respekto kaj internacia kunfratigo.

Sentemo, forĝado, edukado: ŝajnas esti tiuj, la ŝlosilvortoj de la tuta kultura agado, kiun ni povus preskaŭ difini homaman, de Mario Dazzini; temoj kiuj plej bone klarigas la vortojn per kiuj lin rememoris Istvan Szerdahelyi, esperantisto, lingvisto kaj juristo de la Budapeŝta Universitato, kiu estis prezidanto de ILEI de 1985 ĝis 1988: “Mario Dazzini vivis por doni helpon, kaj lia plej granda ĝojo estis vidi la efikon de sia helpo. Samtempe Li estis tre severa kaj postulema tutunue kun si mem kaj kun la aliaj. Sed liaj petoj neniam estis tro postulemaj, Li simple pretendis ke ĉiuj

homoj havu kiel ĉefcelo la veron, la no blecon kaj, jes ja, ankaŭ la profiton. Nenio estis pli malproksima de Li ol la komuna pragmatismo. Estis idealisto en la plej nobla signifo de la vorto, Li neniam forgesis ke la homo valoras tiom kiom li estas je la servo de la aliaj. Lia tuta vivo estis servado, kiel pedagogo samkiel unuaranga funkciulo en pluraj institucioj naciaj kaj internaciaj, Li estis “ministro” en la origina signifo de la vorto, tio estas iu “portanto” je la servo de noblaj kaj idealaj celoj, sen tro da postenoj, sen oficialaj titoloj, sen medaloj. [...] Kaj estis Frato, ne nur de siaj samsangaj gefratoj, kiujn Li amis per vorte neesprimebla amo, sed frato de ĉiuj homoj de bona volo. Kvankam Li estis pli aĝa ol mi, mi neniam rimarkis tiun aĝodiferencon, neniam mi perceptis ke Li estu supera al mi pro aĝo aŭ pro alio, sed Li estis ĉiam apud mi, kun mi. [...] Jen la sekreto de lia eksterordinara laborkapablo: li ĉiam laboris en medio spirite ekvilibra kaj tio disradiis ĉirkaŭ Li. [...] Lia nobla koro laciĝis kaj je certa momento ĉesis bati, sed nur la kora muskolo, lia ora koro kaj lia spirito restas inter ni. Lia vivo restos ĉiam kiel modelo por ni, ankaŭ se ni neniam povos tute imiti lin”. (Oni dankas Michela’n Lipari por la esperantigo)

Bibliografio

Astori, D. 2010. *Comunicazione internazionale e libero pensiero: Esperanto tra pianificazione linguistica e religiosa / Internacia komunikado kaj libera penso: Esperanto inter lingvistika kaj religia planado*, “Interlingvistikaj Kajeroj” 1:2 (2010), pp. 154-193 [http://riviste.unimi.it/index.php/inkoj].

Benedetti, A. 2008. *L’artificio universale. L’esperanto e la Biblioteca Nazionale di Massa*, “Charta” 97 (2008), pp. 60-63.

Benedetti, A. 2010. *La Biblioteca nazionale di Esperanto è di casa a Massa*, “Biblioteche Oggi”, aprile 2010, pp. 39-43.

Gaggero, M. 2007. *L’esperanto a Genova e in Liguria*, “A Compagna” 4 (2007), pp. 7-9 [http://www.acompagna.org/rivista/2007/index.htm].

Rossocci Bastogi, G. 1994. *L’esperanto e Livorno / Esperanto kaj Livorno*, Edistudio, Pisa 1994.

Stoppoloni, U. 1985. *En memoro de Mario Dazzini*, “L’Esperanto”, luglio-agosto 1985, p. 3.

Al la kontribuuntoj

Kiu ajn dezirus proponi kontribuaĵojn (ideojn por la artikoloj, informojn pri eventoj okazintaj ĝis junio 2016 aŭ planotaj por la venonta periodo julio-oktobro, bonvolu sendi plej rapide – kaj nepre ĝis la 15-a de novembro – al: davide.astori.2@gmail.com.

Bonan legadon al ĉiuj! (d.a.)

L'Esperanto

revuo de IEF



IN QUESTO NUMERO

- Saluto** (D. Astori), 2
El la mondo – “Ionel Oneț, la librovendisto de UEA” (M. Lipari), 3
Italoj monde – “El la UK de Nitro”, 6
L'intervista – “Giovanni Agresti e il diritto alla lingua” (D. Astori), 7
Grupo prezentas sin – “Skizo pri historio de Esperantismo en Massa” (A. Simonini), 9
Premio ‘Alpi apuane’ 2016, 10
Niaj eminentuloj – “L'impegno di Mario Dazzini: educare all'integrazione” (N. Reggiani), 11
La itala kongreso – “Kongresi ... junule” (C. Pavese), 15
La itala kongreso – “Kongresi ... mal junule” (N. Minnaja), 17
La itala kongreso – Convegno “Esperanto e lingue minoritarie”, 18
Approfondimenti – “Miguel de Unamuno: esperantista e samideano?” (R. Lamperti), 19
Interlinguistica IV – “I fratelli de Saussure e l'esperanto” (F. Gobbo), 23
Informoj – Premio ‘Trombetta’; nova KIREK; Premio ‘Canuto’ (Parma), 26
Beletristiko – “Clelia Conterno Guglielminetti: donna di cultura e di impegno sociale” (G. Gastaldi), 27
Okazis antaŭ cent jaroj, 31

Saluto

“Or volge l’anno”, cantava il Poeta, un anno, il nostro in casa FEI, di attività, di progetti, di proposte, di sollecitazioni, che trovano spazio sulle pagine della *Revuo*.

Nel ricco e fertile *humus* della vita dei gruppi si staglia la grande vetta del congresso nazionale (che raccontiamo in parallelo dal punto di vista di un adulto e di un giovane). Come ormai il *format* ci ha abituato, incontriamo personalità dell’*esperantujo* (italiana e internazionale). Non si poteva poi, considerando lo scorso anno il trigesimo della scomparsa di Mario Dazzini, colonna dell’esperantismo novecentesco non solo italiano, non dedicare spazio alla realtà massese. E ancora, come richiede la rivista di un movimento che crede che il modo primario di incidere sulla società sia produrre e diffondere cultura, ospitiamo un approfondimento sulla figura di Miguel de Unamuno, di cui il 2016 segna gli ottant’anni dalla morte. Ma anche la presentazione di “poesia al femminile”, che si erano potuti godere solo i *samideanoj* torinesi, e che ora raggiunge tutti i nostri soci. Buona lettura (anche dello speciale in arrivo), allora, e, quando sarà il tempo, Buon Anno! (d.a.)

“Turnu ni la jaropaĝon”, kantis la itala Poeto, jaro, en nia ief-hejmo, plena je agadoj, projektoj, proponoj, instigoj, kiujn la paĝoj de nia revuo gastigas. El la riĉa kaj fekunda *humus* de la grupa vivo nete konturiĝas la granda kulmino de la nacia kongreso (kiun ni rakontas parelele laŭ la vidpunktoj de plenaĝulo kaj junulo). Kiel jam al kutimigis nin la formato, ni renkontos personecoj de esperantujo (itala kaj internacia). Krome, pro la pasintjara datreveno de la forpaso de Mario Dazzini, kolono de la pasintjarcenta esperantismo ne nur itala, ne eblis ne dediĉi spacon al la Massa-esperantistaro. Kaj ne nur, kiel decas por gazeto de movado kiu kredas ke la ĉefa maniero por ludi rolon en la socia vivo estas produkti kaj disvastigi kulturon, ni gastigas eson pri Miguel de Unamuno, kiu forpasis ĝuste antaŭ okdek jaroj. Sed ankaŭ la prezento de “virina poetumado”, kiun povis ĝui nur la torinaj *samideanoj*, nun ni disponigas al ĉiuj niaj geamikoj. Bonan legadon (ankaŭ de la speciala numero alvenonta), do, kaj kiam estos la ĝusta momento, Bonan Novan Jaron! (d.a.)

L'Esperanto
revuo de IEF

Direttore Responsabile – Leĝe Respondeca
Direktoro: Davide ASTORI
tel. 320 2914608 – davide.astori.2@gmail.com

Redattori – Redaktoroj:
Renato CORSETTI, Pier Luigi CINQUANTINI
Progetto grafico e impaginazione – Grafika
ideo kaj enpaĝigo: Nicola REGGIANI

Amministrazione – Administrejo:
FEI – Federazione Esperantista Italiana
Via Villorosi, 38 – I 20143 Milano
tel. 02 5810 0857 – fax 02 3674 0711
mail: feisegreteria@esperanto.it
<http://www.esperanto.it> - C.F. 80095770014

C.C. Bancario – Bankkonto:
Banca Prossima - Milano
IBAN: IT21M03359001600000119380
BIC/SWIFT: BCITITMX

C.C. Postali – Poŝtkontoj:
C.C. postale FEI: n.37312204
IBAN: IT9400760101600000037312204
BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Consiglio Direttivo FEI – IEF-Estraro:
Michela LIPARI, presidente
Davide ASTORI, vicepresidente
Laura BRAZZABENI, segretario
Renato CORSETTI, attività informativa
Riccardo PINORI, segretario-tesoriere
Ivan ORSINI, attività editoriale, IEF
Paolo SCOTTI, attività informatica

Pubblicazione riservata agli Associati.
Quote associative 2016 (comprehensive di € 10
dell’abbonamento alla rivista, per tutti gli
associati tranne gli Associati Familiari)
Associato ordinario € 28,00
Associato sostenitore € 84,00
Associato garante € 280,00
Associato fino a 25 anni € 14,00
Associato familiare € 14,00
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure
direttamente presso l’amministrazione FEI.

Registrazione al Tribunale di Milano n. 85 del
27 febbraio 1970.

Stampata presso www.atena.net



ISSN 1974-9147



9 771974 914006